

19 LA LASTA JUĜO

Misfama, multobla, per pluraj arest-ordonoj kaj la tuta ĝendarm-armeo kaj detektivoj persekutata murdinto Kugler deklaris, ke oni lin ne kaptos kaj ankaŭ oni ne kaptis lin, almenaŭ ne vivantan. La lasta, entute naŭa lia murd-ago estis, ke li pafmortigis ĝendarmon, volanta lin aresti. La ĝendarmon li pafmortigis, sed lin mem trafis sep kugloj, el kiuj tri estis nepre mortigaj. Tiel ŝajne li eskapis antaŭ la tera justeco.

Lia morto venis tiel rapide, ke li eĉ tempon ne havis eksenti konsiderindan doloron. Kiam lia animo forlasis la korpon, ĝi povis miregi pro la strangaĵoj de la transa mondo, mondo ekster spaco, griza kaj senfine dezerta, sed li ne miregis. Homo estinta en karcero, ankaŭ en Ameriko, opinias la transan mondon simple nova medio, en kiu kun ioma kuraĝo li trabatalos sin kiel ie ajn.

Fine proksimiĝis al Kugler la neevitebla Lasta Juĝo. Ĉar en la ĉielo estas eterne rajtsuspenda stato, li venis antaŭ Senaton kaj ne antaŭ Asizon, kiel li eble estus atendinta laŭ siaj agoj. La juĝejo estis simple establita, same kiel sur la tero; pro baldaŭ ekkoneblaj kaŭzoj mankis tie kruco, ĉe kiu ĵuras la atestantoj. Estis tri juĝistoj, ĉiuj maljunaj, meritaj konsilistoj de severaj kaj teditaj vizaĝoj. Formalaĵoj estis iom enuigaj: Kugler Ferdinando, sen okupo, naskiĝinta tiun kaj tiun tagon, mortis... Tiam montriĝis, ke Kugler ne scias daton de sia morto; tuj li rimarkis, ke ĉi tiu misatento malutilas al li antaŭ la okuloj de la tribunalo, kaj li obstiniĝis. "Per kio vi iĝis kulpa?" demandis la prezidanto. "Per nenio," diris Kugler obstinege. "Venigu atestanton," ĝemis la prezidanto.

Kontraŭ Kugler sidiĝis fortstatura, tute neordinare granda maljunulo, vestita per blua mantelo, plenplena de orsteloj; ĉe lia alveno la juĝistoj stariĝis, kaj ekstaris ankaŭ Kugler, kontraŭ sia volo ravita. Nur, kiam sidiĝis la maljunulo, residiĝis la juĝistoj.

19 POSLEDNÍ SOUD

Povĉstný, mnohonásobný, několika zatykači a celou armádou četníků i detektivů stíhaný vrah Kugler prohlásil, že ho nedostanou, a také ho nedostali, aspoň živého ne. Poslední, vcelku devátý jeho vražedný kousek byl, že zastřelil četníka, který ho chtěl zatknout. Četníka sice skolil, ale sám dostal sedm kulí, z nichž tři byly naprosto smrtelné. Tím zdánlivě unikl pozemské spravedlnosti.

Jeho smrt přišla tak rychle, že ani neměl času pocítit obzvláštní bolest. Když jeho duše opustila tělo, mohla užasnout nad podivnostmi onoho světa, světa mimo prostor, šerého a nekonečně pustého, ale neužasla. Člověk, který byl v žaláři i v Americe, považuje onen svět prostě za nové prostředí, v němž se s trochou statečnosti protluče jako kdekoliv jinde.

Konečně nadešel Kuglerovi nevyhnutelný Poslední Soud. Poněvadž v nebi je věčně stav výjimečný, přišel před Senát, a nikoliv před Porotu, jak by byl dle svých skutků snad očekával. Soudní síň byla zařízena prostě, tak jako na zemi; z důvodů, jež záhy nahlédnete, scházel tam kříž, u kterého přísahají svědkové. Soudcové byli tři, vesměs staří, zasloužili radové přísných a omrzelých tváří. Formality byly poněkud nudné: Kugler Ferdinand, bez zaměstnání, narozený toho a toho dne, zemřel... Tu se ukázalo, že Kugler nezná datum své smrti; viděl hned, že toto opomenutí mu v očích soudu škodí, i zatvrdil se. "Čím se dáváte vinen," ptal se předseda. "Ničím," řekl Kugler zarytě. "Přiveďte svědka," vzdychl předseda.

Protí Kuglerovi usedl mohutný, přímo neobyčejně veliký stařec, oděný modrým pláštěm, posetým zlatými hvězdami; při jeho příchodu soudcové vstali, a vstal i Kugler, proti své vůli, okouzlen. Teprve když stařec se posadil, usedl soud znovu.

"Atestanto," komencis la prezidanto, "Dio Ĉioscia, ĉi tiu Lasta Senato venigis vin, ke vi prezentu atestaĵon en afero de Kugler Ferdinando. Estante Plej Alte Verama, vi ne bezonas ĵuri. Nur ni petas vin, ke vi en intereso de la proceso limigu vin al la afero kaj ne deflankiĝu al detaloj nehavantaj kontraŭleĝan karakteron. Kaj vi, Kugler, ne interrompu parolon de la atestanto. Li scias ĉion, vane vi neadus. Mi petas sinjoron atestanton, ke li depoziciu."

Dirinte tion, apogis sin la prezidanto oportune per kubutoj je tablo kaj deprenis orajn okulvitrojn, evidente preparita je pli longa parolo de la atestanto. La plej maljuna senatano sidiĝis komforte por dormi. Protokolanta anĝelo malfermis la libron de l' vivo. Atestanto Dio tusetis kaj komencis:

"Jes, Kugler Ferdinando. Ferdinando Kugler, filo de fabrikoficisto, estis de sia junaĝo mismora infano; ci bubo, kiom ci ĉagrenis! La panjon li ege amis, sed hontis tion montri; tial li estis ribelema kaj malobeo. Ĉu vi memoras, ke vi ekmordis polekson de paĉjo, kiam li volis vin bati, ĉar vi ŝtelis rozojn en ĝardeno de notario? "La rozoj estis por Irma el familio de impostisto," rememoris Kugler.

"Mi scias," diris Dio. "Tiam ŝi estis sepjara. Kaj ĉu vi scias, kio poste okazis kun ŝi?" "Mi ne scias." "Ŝi edziniĝis, edzine prenis Oskaron, filon de fabrikanto; li seksinfektis ŝin kaj dum aborto ŝi mortis. Ĉu vi memoras pri Rudolfo Záruba?" "Kio okazis kun li?" "Homo, tiu iĝis maristo kaj pereis en Bombajo. Vi du estis la plej malbonaj buboj en la tuta urbo. Kugler Ferdinando ŝtelis jam en sia deka jaro kaj mensogis senĉese; li rilatis kun malbona societo, kiel estis drinkulo kaj almozulo Dlabola, kun tiu li dividis sian mangaĵon."

La juĝisto mangestis, tio ja ne apartenas ĉi tien; sed Kugler mem singene demandis: "Kaj ... kio okazis kun lia filino?"

"Kun Maria?" diris Dio. "Tiu tute senmoraligis. En sia dekkvara jaro ŝi vendadis sin, kiel dudekjara ŝi mortis kaj agoniante rememoris vin.

"Svedku," počal předseda, "Bože Vševědoucí, tento Poslední Senát vás povolal, abyste podal svědectví ve věci Kuglera Ferdinanda. Jsa Nejvyšš Pravdomluvný, nemusíte přísahat. Žádáme vás jenom v zájmu líčení, abyste se držel věci a neodbočoval do podrobností, jež nemají nezákonné povahy. A vy, Kuglere, neskákejte svědkovi do řeči. Ví vše, zbytečně byste zapíral. Proším pana svědka, aby vypovídal."

To řka, opřel se předseda lokty pohodlně o stůl a sňal zlaté brýle, patrně připraven na delší řeč svědkovu. Nejstarší votant se uvelebil k spaní. Zapisující anděl otevřel knihu života. Svědek Bůh lehce odkašlal a počal:

"Ano, Kugler Ferdinand. Ferdinand Kugler, syn továrního úředníka, byl odmalička zkažené dítě; ty kluku, ty ses nazlobil! Maminku měl strašně rád, ale styděl se to dát najevo; proto byl vzpurný a neposlušný. Pamatuješ se, jak jsi kouzl tatínka do palce, když ti chtěl natlouci, že jsi kradl růže v notářově zahradě?" "To byly růže pro berních Irmu," vzpomínal Kugler. "Já vím," řekl Bůh. "Bylo jí tehdy sedm let. A že nevíš, co se s ní potom stalo?" "Nevím." "Vdala se, vzala si Oskara, syna továrníkova; nakazil ji a při potratu zemřela. Pamatuješ se na Rudu Zárubova?" "Co se s ním stalo?" "Ten se dal, člověče, k námořníkům a zahynul v Bombaji. Vy dva jste byli nejhorší kluci v celém městě. Kugler Ferdinand kradl už ve svém desátém roce a lhal napořád; chodil do špatné společnosti, jako byl opilec a žebrák Dlabola, se kterým se dělil o své jídlo."

Soudce pokynul rukou, to že snad sem nepatří; ale Kugler sám se ptal ostýchavě: "A... co se stalo s jeho dcerou?"

"S Mařkou?" řekl Bůh. "Ta se docela spustila. Ve čtrnácti se prodávala, ve dvaceti zemřela a vzpomněla na tebe v agonii smrti.

En via dekkvara jaro vi ebrigadis vin kaj fuĝadis el la hejmo. Via patro ĝismorte turmentigis pro aflikto kaj via patrino plorkonsumis siajn okulojn; vi senhonorigis vian gepatran domon, kaj via fratineto, via bela fratino Marteta ne trovis fianĉon, kiu venus por ŝi en domon de ŝtelisto. Ŝi vivas solece kaj en malriĉo, elĉerpata pro etaj laborenspezoj, per kiuj ŝin mizerikordaj homoj vundadas."

"Kion ŝi faras ĝuste nun?" "Ĝuste nun ŝi estas en butikoj de Vlček kaj aĉetas fadenojn, por kudri ĝis la krepuskiĝo. Ĉu vi memoras la butikon? Foje vi aĉetis tie vitran irizan globeton; tiam vi estis sesjara; kaj jam unuan tagon vi perdis la globeton kaj ne kaj ne ĝin trovi. Ĉu vi rememoras, kiel tiam vi ploraĉis pro kolerego kaj bedaŭro?" "Kien ĝi tiam forruliĝis?" demandis Kugler sopire. "En forfluejon sub defluilo. Ja, homo, tie ĝi kuŝas ĝis nun, kaj de tiam pasis tridek jaroj. Ĝuste nun pluas sur la tero kaj la vitra globeto skuas en la malvarma, plaŭdanta akvo."

Kugler mallevis la kapon superita. Sed la prezidanto surmetis la okulvitrojn kaj diris milde: "Atestanto, ni devas transiri al la afero. Ĉu la akuzito murdis?" Dio atestanto kapskuis. "Naŭ homojn li mortigis. La unuan homon en la interbatiĝo. Por tio li senmoraligis en la malliberejo. La dua estis malfidela amatino. Pro tio li estis kondamnita al morto kaj fuĝis. La tria estis maljunulo, kiun li prirabis. La kvara estis noktgardisto."

"Ĉu tiu mortis?" ekkriis Kugler. "Li mortis post tri tagoj," diris Dio, "en teruraj doloroj kaj postlasis ses infanojn. La kvina kaj sesa estis du maljunaj geedzoj; li batmortigis ilin per hakilo kaj trovis nur dek ses kronojn, dume ili havis kaŝitajn pli ol dudek mil."

Kugler eksaltis: "Mi petas, kie?" "En pajlomatraco," diris Dio. "En tolsako sub la matraco, kie ili kaŝis sian monon ĉantaĝitan per uzuro kaj avaro: La sepan homon li mortigis en Ameriko; li estis almigranta samlandano, senkonsila kiel infano." "Do en la pajlomatraco ĝi estis," flustris Kugler mirigite. "Jes," daŭrigis la atestanto.

Ve ĉtrnáci letech ses opíjel a utíkal jsi z domova. Tvůj otec se utrápil hořem a tvá matka si vyplakala oči; zneuctil jsi svůj dům, a tvá sestřička, tvá hezká sestra Martička, nenašla ženicha, který by pro ni přišel do domu zlodějova. Žije ještě v samotě a chudobě, uštvaná drobnými výdělky, kterými ji milosrdní lidé zraňují."

"Co dělá zrovna teď?" "Zrovna teď je u Vlčků v krámě a kupuje nitě, aby šila do setmění. Pamatuješ se na ten krám? Koupil sis tam jednou skleněnou duhovou kuličku, to ti bylo šest let; a hned první den jsi kuličku ztratil a ne a ne ji nalézt. Pamatuješ se; jaks tehdy brečel vztekem a lítostí?" "Kam se to tenkrát zakutálela?" ptal se Kugler dychtivě. "Ale do odtoku pod okapem. Vždyť, člověče, tam leží doposud, a je už tomu třicet let. Zrovna teď na zemi prší a skleněná kulička se otrásá v chladné, zurčící vodě."

Kugler sklonil hlavu překonán. Ale předseda nasadil si brýle a řekl mírně: "Svědku, musíme přejít k věci. Vraždil obžalovaný?" Bůh svědek potřásl hlavou. "Devět lidí zabil. Prvního člověka ve rvačce. Zato se zkažil v kriminále. Druhá byla nevěrná milá. Za to byl odsouzen k smrti a utekl. Třetí byl stařec, kterého oloupil. Čtvrtý byl noční hlídač."

"Ten zemřel?" vykřikl Kugler. "Zemřel po třech dnech," řekl Bůh, "v hrozných bolestech a nechal po sobě šest dětí. Pátý a šestý člověk byli dva starí manželé; ubil je sekerou a našel jen šestnáct korun, zatímco měli schováno přes dvacet tisíc."

Kugler vyskočil: "Prosím vás, kdepak?" "Ve slamníku," řekl Bůh. "V plátěném pytlíčku pod slamníkem, kde skrývali své peníze vydřené lichvou a lakotou. Sedmého člověka zabil v Americe; byl to přistěhovalec, krajan, bezradný jako dítě." "Tak ve slamníku to bylo," šeptal Kugler užasle. "Ano," pokračoval svědek.

"La oka homo estis piediranto, hazarde transanta vojono de Kugler, kiam oni persekutis lin. Tiam li havis periostiton kaj frenezis pro doloro. Homo, vi multe suferis. La lasta estis ĝendarmo, kiun li pafmortigis, ĝuste antaŭ sia morto."

"Kial li murdis?" demandis la prezidanto. "Kiel la aliaj homoj," respondis Dio; "pro kolero, pro monavido, post pripenso kaj hazarde, iam kun ĝuo kaj aliffoje pro neceso. Li estis donacema kaj iam helpis al homo. Li estis bona al virinoj, ŝatis bestojn kaj tenis la vorton. Ĉu mi citu liajn bonajn agojn?"

"Dankon," diris la prezidanto, "ne necesas. Akuzito, ĉu vi volas ion diri plede por vi?" "Ne," diris Kugler indiferece; ĉar nun ĉio estis al li egala. "La tribunalo foriros por la konsilio," deklaris la prezidanto, kaj tri konsilistoj foriĝis.

Dio kaj Kugler restis en la juĝejo. "Kiu ili estas?" demandis Kugler kapmontrante al la forirantoj. "Homoj kiel vi," diris Dio. "En la mondo ili estis juĝistoj kaj ili juĝas do ankaŭ ĉi tie." Kugler mordetis siajn fingrojn. "Mi opiniis... nome, mi ne zorgis pri tio, sed... mi atendus, ke juĝos vi, kiel... kiel..." "Kiel Dio," findiris la granda oldulo. "Sed jen ĝuste tio, komprenu. Ĉar mi ĉion scias, tute mi ne povas juĝi. Tio ne eblas. Ĉu vi scias, kiu vin tiam denunciis?" "Mi ne scias," diris Kugler surprizite. "Lucia, kelnerino; ŝi denunciis vin pro ĵaluzo." "Pardonu," ekkuraĝis Kugler, "sed vi forĝesis diri, ke en Ĉikago mi pafmortigis tiun fiulon Teddy." "Ba ne," oponis Dio, "tiu konvaleskis el tio kaj vivas ĝis nun. Mi scias, ke li estas denuncianto; sed, homo, alie li estas bonulo kaj ege amas infanojn. Nur ne pensu, ke iu estas tute malbona."

"Kial vi... kial vi, Dio, ne juĝas mem?" demandis Kugler mediteme. "Ĉar mi scias ĉion. Se la juĝistoj ĉion, sed nepre ĉion scius, ankaŭ ili ne povus juĝi; nur ili komprenus ĉion, eĉ la koro dolorus ilin el ĉio. Kiel nur mi povus vin juĝi? Juĝisto scias nur pri viaj krimoj; sed mi scias ĉion pri vi. Ĉion, Kugler. Kaj tial mi ne povas vin juĝi."

"Osmý člověk, to byl chodec, který se mu namátl do cesty, když ho honili. Tehdy měl zánět okostice a šlel bolestí. Člověče, tys mnoho zkusil. Poslední pak byl četník, kterého skolil, právě než umřel."

"Proč vraždil?" tázal se předseda. "Jako jiní lidé," odpovídal Bůh; "ze zloby, z chtivosti peněz, s rozvahou i nahodile, někdy s rozkoší a jindy z nutnosti. Byl štedrý a někdy pomáhal lidem. Byl hodný k ženám, měl rád zvířata a držel své slovo. Mám uvést jeho dobré skutky?"

"Děkuji," řekl předseda, "není třeba. Obžalovaný, máte co říci k svému obhájení?" "Ne," pravil Kugler lhostejně; neboť teď už mu bylo všechno jedno. "Soud se odebere k poradě," prohlásil předseda, a tři radové se vzdálili.

Bůh i Kugler zůstali v soudní síni. "Kdo to jsou?" ptal se Kugler, ukazuje hlavou za odcházejícími. "Lidé jako ty," řekl Bůh. "Byli na světě soudci, a tož soudí i tady." Kugler si hryzl prsty. "Myslil jsem... totiž, nestaral jsem se o to, ale... čekal bych, že budete soudit vy, jakožto... jakožto..." "Jakožto Bůh," dokončil veliký stařec. "Ale to je právě to, víš? Protože všechno vím, nemohu vůbec soudit. To přece nejde. Že nevíš, Kuglere, kdo tě tentokrát udal?" "Nevím," řekl Kugler překvapen. "Lucka, sklepnice; udala tě ze žárlivosti." "Promiňte," osmělil se Kugler, "ale vy jste zapomněl říci, že jsem zastřelil v Chicagu toho ničemu Teddyho." "Ale kdepak," namítl Bůh, "ten se z toho vylízal a je živ doposud. Já vím, že je udavač; ale on je, člověče, jinak dobrák a hrozně má rád děti. Jen si nemysli, že někdo je tak docela ničema."

"Proč vlastně vy... proč ty, Bože, nesoudíš sám?" tázal se Kugler zamýšleně. "Protože všechno vím. Kdyby soudcové všechno, ale naprosto všechno věděli, nemohli by také soudit; jen by všemu rozuměli, až by je z toho srdce bolelo. Jakkp bych já tě mohl soudit? Soudce ví jenom o tvých zločinech; ale já vím o tobě všechno. Všechno, Kuglere. A proto tě nemohu soudit."

"Kaj kial do juĝas tiuj homoj... ankaŭ en la ĉielo?" "Ĉar la homo apartenas al homo. Mi estas, kiel vi vidas, nur atestanto; sed pri la puno, sciu, pri la puno decidas la homoj - ankaŭ en la ĉielo. KREDU MIN, Kugler, tio estas en ordo; la homoj meritas alian justecon, nur la homan." En tiu momento revenis la juĝistoj de la konsilio kaj la prezidanto de la Lasta Juĝo fortvoĉe anoncis: "Kugler Ferdinando estas kondamnita pro naŭfoje ripetita krimo de insida murdo, mortigoj kaj raboj, pro delikto de revertenco, pro kontraŭleĝa armilportado kaj pro ŝtelo de rozoj al dumviva puno en infero. La puno tuj validas. Mi petas, nun plua kazo. Ĉu ĉeestas akuzito Machát Francisko?"

"A proč tedy soudí... ti lidé... i na nebi?" "Protože člověk patří člověku. Já jsem, jak vidíš, jenom svědek; ale o trestu, víš, o trestu rozhodují lidé – i na nebi. Věř mi, Kuglere, je to v pořádku; lidé si nezasluhují jiné spravedlnosti než lidské." V té chvíli vrátil se soud od porady a předseda Posledního Senátu přednesl silným hlasem: "Kugler Ferdinand odsuzuje se pro devětkrát opakovaný zločin vraždy úkladné, zabití a loupeže, pro přečin revertence, pro neoprávněné nošení zbraně a pro krádež růží k doživotnímu trestu pekla. Trest nastoupí ihned. Prosím, nyní další případ. Je tu obžalovaný Machát František?"